

VOĈO DE KURACISTOJ

Monata revuo por internacia korespondado de Kuracistoj

En unuenco estas forto.

Adreso de la redakcio kaj administracio:

D-ro Stefan Mikołajski
Lwów, Strato Śniadeckich Nro 6
Aŭstrio-Galicio.



Eliradas la 1-an de ĉiu monato.

Abonprezo jare: 2 spesmiloj = 4.80
kronoj aŭstriaĵ = 4 markoj = 5 fran-
koj = 4 ŝilingoj = 2 rubloj = 1 dolaro.

REDAKTORO: D-RO STEFAN MIKOŁAJSKI.

Kunlaborantoj: Anglujo. D-ro J. C. G. Reed (Chatham), d-ro R. Warden Briggs (Birmingham), d-ro G. Johnston (London). Aŭstrio. D-ro Edmund Sós (Wien). Belgujo. D-ro W. Broeckaert (Antwerpen). Bohemujo. D-ro A. Bischitzky (Prag), d-ro Jozef Sedlaček (Jenikov), d-ro Šipek (Prag). Brazilio. D-ro Reinaldo Fred. Geyer (Bagoary). Bulgarujo. Petro Penkov (Jambol). Francujo. D-ro Artigues (Versailles), s-ino A. Blondin (Nice), d-ro Briquet (Armentieres), d-ro Crozat (Givors), d-ro Cuisnier (Rennes), prof. d-ro H. Dor (Lyon), d-ro Le Duigou (Cherbourg), d-ro L. Hopenhendler (Nice), d-ro L. Jenny (Chalons-sur-Marne). Germanujo. D-ro Behm (Witten), d-ro K. Briegleb (Worms), d-ro Kaiser (Dresden), d-ro Kleider (Nordhausen), d-ro Kunschert (Wiesbaden), d-ro Leuwer (Bonn), d-ro Papsch (Innsbruck), d-ro Rothschuh (Aachen), d-ro Spancken (Meschede), d-ro Stubenvoll (Reichenhall), d-ro K. Weiss (Gmünd). Hispanujo. D-ro Rogelio Perez Domingo (Huermeces), d-ro Linarés (Cordoba), d-ro Jorge S. de Hita (La Arboleda), d-ro Rafael de San Millan (Madrid), d-ro Federico Montaldo (Madrid), d-ro Navarro Mingote (Biota). Holando. D-ro Smulders (Schijndel). Hungario. D-ro Austerlitz (Koložsvár), d-ro Kováts József (Budapeŝt), d-ro Schatz (Budapeŝt). Japanujo. D-ro S. Yamasaki (Kioto). Kanado. D-ro A. J. Hunter (Teulon). Kroatujo. S-ino Danica de Bedeković (Zagreb). Moravio. D-ro A. Jouza (Stražek). Polujo. D-ro K. Bein (Varsovio), prof. d-ro Bujwid (Kraków), d-ro I. Fels (Lwów), d-ro Gelibter (Zamość), d-ro A. Goldenberg (Łódź), d-ro Kleski (Jabłonów), d-ro I. Krenicki (Varsovio), d-ro J. Krenicki (Varsovio), d-ro Polikier (Varsovio), d-ro Salpeter (Podhajce), d-ro B. Skalkowski (Lwów), A. Szewczuk (Bełz), prof. d-ro Wrzosek (Kraków), d-ro Leon Zamenhof (Varsovio), d-ro Zenczykowski (Płock). Rumanujo. D-ro Haralambi (Turnu Magurele), d-ro G. Robin (Bukarest). Ruslando. D-ro Abramson (Nogajsk), d-ro P. Gracianov (Lebedin), d-ro Kirilov (Nikolsk, Siberio), d-ro V. Koposov (Simbirsk), G. Krajs (Odessa), d-ro B. Perott (Halila), d-ro Portnjagin (Simbirsk), d-ro Rebrov (Vladivostok), d-ro I. Sameckij (Gizak), d-ro Sobolev (Poltava). Svisujo. D-ro Fr. Uhlmann (Hutvil). Unuigitaj Ŝtatoj de Ameriko. D-ro J. B. J. Brossard (Laprairie), d-ro S. L. Roseboom (Rochester), d-ro Wallace (Louisville), d-ro E. M. Webster (Chicago). Aŭstralio. D-ro V. Lamb (Elliston), Fras Evelyn Place (Adelaida).

D-ro Kunschert (Wiesbaden).

Hemeralopio en la prusa armeo.

La interesa artikolo de doktoro Rebrov en Vladivostok: „Al la demando pri hemeralopio“ en la januara numero 1911 de „Voĉo de Kuracistoj“ instigis min esplori la oftecon de tiu ĉi malsano en la prusa militistaro.

Dank' al afableco de sinjoro doktoro Stapelfeldt, ĉefkuracisto de la Wiesbadena garnizona hospitalo prosperis al mi ricevi ekstraktojn el la sanitaraj raportoj de la prusa armeo pri tiu ĉi afero por la periodo de tridek kvin jaroj. Petinte la permeson de la generalo ĉefkuracisto de la prusa armeo pri la publikigo de tiuj ĉi ekstraktoj en „Voĉo de Kuracistoj“, mi ricevis anko-

raŭ kelkajn detalajn raportojn pri epidemia hemeralopio dum la jaro 1905 kaj mi povis kunmeti jenan skizon:

Hemeralopio en la prusa armeo estas nur sporada malsano kaj ĝia ofteco ŝajnis ankoraŭ plimalgrandiĝi je la fino de la antaŭa jarcento. Dum la tuta tempo de tridek kvin jaroj (1873 — 1907) estis observataj ĉirkaŭe 800 kazoj de hemeralopio, malgranda nombro rilate al la militistaro. Dum la jaro 1873 estis notataj 82 malsaniĝoj, dum kvin jaroj 1874—1878: 228, en 1879 nur 4, en la sekvintaj du jaroj 1880—1881: 59, en 1884—1888: 121, en 1888 kaj 1889 ne niu kazo.

De la jaro 1890 ĝis 1900 estas notitaj nur ĉirkaŭe 54 kazoj, de 1901 ĝis 1907 74 kazoj, el kiuj 50 malsaniĝoj apartenis al unu epidemio en la garnizono de Brieg kaj 20 al malgranda epidemio en Neisse somere 1905, pri kiuj mi detale raportos pli sube.

Oni vidas, ke la nombro de la hemeralopiuloj tute ne estas proporcie dismetita tra la apartaj jaroj, sed certe malgrandiĝo sin montris je la fino de la antaŭa kaj la komenco de la nuna jarcento.

Niajn legantojn eble interesos la fakto, insiste akcentata en diversaj jaraj raportoj, ke la malsano okazis preskaŭ nur dum la someraj monatoj kaj precipe en la orientaj militkorpusoj de la provincoj, najbaraj al la rusa imperio, en la garnizonoj de Koenigsberg, Danzig, Graudenz, Thorn, Pillau, Magdeburg, Neisse, Glatz, Cosel, Brieg. En unu raporto estas citataj pli oftaj malsaniĝoj inter kamparanoj de Posewalk (Pomerujo) kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Kelkfoje hemeralopio estis observata ĉe malliberuloj en fortikaĵoj, eĉ en la pliokcidentaj garnizonoj de Minden kaj Strassburg. Plej ofte malsaniĝis malfortaj kaj post aliaj suferadoj, kiel ekzemple intermita febro, anemiaj kaj palaj soldatoj; sed sufiĉe ofte ankaŭ sanaj kaj fortaj personoj malsaniĝis, preskaŭ ĉiam post trolaĉigo de la retino per helaj radioj de suna lumo tage aŭ per elektra lumo dum noktaj manovroj.

Nur malmultaj pacientoj montris gravajn difektojn de la retino kaj de la vidonervo, kelkfoje kserozo de la sklero ĉeestis, sed plej ofte nenormaleco neniu estis trovebla; hereda dispozicio, truo de tabako per fumado kaj flarado malofte kiel kaŭzoj estis supozeblaj; laŭ la eldiro de unu soldato, kiu de infana aĝo somere suferis hemeralopion, sammaniere lia patro kaj tri fratoj dum la someraj monatoj estis atakitaj de la malsano.

Pri la epidemioj, jam supre cititaj, en la garnizonoj de Brieg kaj Neisse mi devas ankoraŭ diri kelkajn vortojn. En Brieg malsaniĝis ĉirkaŭe 50 infanterianoj de la unua kaj dua bataliono de la regimento 157, en Neisse 20 soldatoj de la unua bataliono de la regimento 23. Ĉiuj malsaniĝoj, esceptinte unu en marto kaj tri en aprilo, okazis en la monatoj majo, junio kaj julio kaj preskaŭ ĉiam post blindetigo per suna lumo dum streĉantaj marŝoj aŭ post noktaj milit-ekzercadoj kaj ĝenerala laciĝo. Kelkajn malsanulojn, ne trovantajn la vojon dum noktaj manovroj, kamaradoj devis konduki hejmen.

Laŭ la raportoj regimentaj estis tre

strange, ke en Neisse nur la unua bataliono de la regimento 23 liveris malsanulojn, dum en Brieg, kie du batalionoj de la regimento 157 loĝis en la sama kazerno kun la unua bataliono de la regimento 156, esceptinte unu kazon, nur la regimento 157 montris malsaniĝojn je hemeralopio. Prave diras la raporto pri tiu ĉi afero: Oni devas supozi, ke tiel la suna blindetigo kiel la streĉantaj noktaj marŝoj kaŭzas la malsanon, ĉar pruveble la I bataliono de la regimento 156 ne faris tiel oftajn kaj streĉantajn ekzercadojn dum varmegaj kaj sunbrilaj tagoj, kiel la 157 regimento kaj nur unu noktan manovron. La regimenta raporto de Neisse kulpigas kiel kaŭzojn de la malsaniĝo manovrojn kaj laciĝojn en la ekzercado de Lambsdorf, kien la bataliono estis elmarŝinta kun bivakadoj, plie la blindigon per la sunbrilo kaj ĝeneralan laciĝon. Laŭdire dum la monatoj majo kaj junio 1905 preskaŭ ĉiam regis varmego kaj sunbrilo. Difektoj de la nutrado, de la vivmaniero rilate al fumado aŭ ĝuado de alkoholo ne estis pruveblaj, la hemeralopiuloj plej multe estis sanaj kaj fortaj soldatoj, laŭregule vivantaj. La esplorado de la okuloj montris ĉe plej multaj malsanuloj helajn, grizajn aŭ bluajn, nur malmulte da pigmento havantaj iridojn, sufiĉe ofte dikigon de la palpebraj randoj kaj kataron de la konjunktivo, kelkfoje ankaŭ negravan keratiton aŭ pingvekulon sur la rando de la korneo; iafaje ĉeestis kserozo de la sklero. En la spegubildo la okula postaĵo aperis tre pala kaj anemia, cetere normala, nur malofte la retino sin montris pli malhela; la vidokapableco tage estis normala.

La terapio (ĉie preskaŭ la sama) estis jena:

En Brieg oni loĝigis la malsanulojn en du grandajn ĉambrojn de la kazerno, en Neisse en la garnizonan hospitalon. Tage kaj nokte sanitara suboficiro observadis ilin, zorgis pri bona nutrado (dublaj viandoporcioj kaj legomoj), 3—4 foja dozo de unu kulero da fiŝoleo, evito de hela sunlumo. La kserozo estis kuracata sukcese per unguento el hidrargo amido-bichlorata.

La malsano daŭris 14—18 tagojn meznombre; preskaŭ ĉiuj malsanuloj resaniĝis: Nur la soldatoj, kiuj montris difektojn de la vidokapableco aŭ ŝanĝojn en la retino ne resaniĝeblajn, aŭ pli ol unu remalsaniĝon je hemeralopio, estis eksigitaj kiel invaliduloj. Eble interesos kelkajn legantojn aŭdi, ke laŭ la raportoj la hemeralopio atakis sammezure la soldatojn de diversaj servojaroj kaj ke suboficiroj tute ne malsaniĝis. Rilate al la profesio antaŭ la milit-

servo ne estis rimarkebla diferenco: kamparanoj kaj metiistoj, aŭ fabriklaboristoj kaj ministoj estis sammaniere atakitaj de la malsano. Tre interesa estas la raporto de la speciala okulisto kaj ĉefkuracisto de la kvindek unua regimento doktoro Krienes, kiu (mem skribinta: „pri akuta hemeralopio“ 1895) estis sendita Briegon de la generala komando, por konstati la kaŭzojn de la grandnombra malsaniĝado je hemeralopio en la 157-a regimento kaj por fiksi ĝian kontraŭbataladon.

Sinjoro Krienes opinias, ke la kaŭzo de hemeralopio estas malfortigo de la sentbleco kaj mallarĝigo de la vidokampo por ruĝaj kaj bluaj lumradioj per ŝanĝo de la pigmento de la retino. La akomodebleco kaj adaptebleco al la malheleco estas malgrandigitaj per manko de ekvilibro inter la konsumo kaj regenerado de la vidŝtofoj. La komencon de la malsano preskaŭ ĉiam sekvas blindetigo aŭ malutilo de la nutrado.

Rilate al la kaŭzoj de la hemeralopio en la 157-a regimento d-ro Krienes evidente argumentas, ke nek difektoj de la nutrado nek lokalizitaj malsanoj de la retino aŭ ĥorio (kiel retinito pigmentoza) efikas la hemeralopion, sed nur tro forta kaj tro daŭranta blindigo per suna lumo dum la plej helaj monatoj de la jaro kaj ankoraŭ tiu ĉi cirkonstanco, ke multaj malsanuloj laŭ la rezultato de la spegulesplorado inklinitaj al blindigo pro nesufiĉa kaj difekta pigmento de la retino.

Ekstere la malsanaj okuloj montris la samajn aliigojn, kiel supre laŭ la regimentaj raportoj estas dirite, kserozon, dikiĝon de la kornea rando, hiperemion de la korneo kaj konjunktivo, kiuj simptomoj de kelkaj aŭtoroj estas konsiderataj kiel inklinitaj al hemeralopio.

Aprobinte ĉiurilate la ĝisnunan kuracodon, sinjoro Krienes rekomendis la uzadon de flavgrizaj konkiformaj okulvitroj dum

lumplena vetero por soldatoj, kiuj inklinitaj al blindigo kaj hemeralopio.

Supozante, ke la minekspluatado pro la ŝanĝanta lumigado treege inklinitas la okulojn de la ministoj kaj metalfosistoj al hemeralopio, mi skribis pri tiu ĉi temo al la fama okulkuracisto kaj okulisto de la ministoj sinjoro doktoro Schoenemann en Saarbrücken. Li respondis al mi, ke hemeralopio inter la ministoj estas tre malofta, certe ne pli ofta, ol ĉe la alia loĝantaro. Cetere la malsano en la okcidenta Germanujo estas tre malofta kaj ĉiam la sekvo de gravaj difektoj en la nutrado. Verŝajne hemeralopio estas kaŭzata per la baciloj de la kserozo, kiuj certe kunhelpas ĉe malforteco kaj trolaciĝo. Diversaj malsanoj de la retino kaj ĥorio (malofte estas akompanataj de hemeralopio (ekzemple retinito pigmentoza).

Resumante je la fino de mia raporto la demandojn de sinjoro Rebrov, mi devas diri, ke la observadoj pri hemeralopio en la prusa armeo, escepte la pli malgrandan nombron, estas preskaŭ konformaj al la citaĵoj pri la rusa armeo. Jen la respondoj:

ad 1) En la orienta Germanujo okazas sporadaj malsaniĝoj kaj maloftaj epidemioj de hemeralopio tiel en la armeo, kiel en la loĝantaro.

ad 2) Plej nombraj malsaniĝoj estas observataj en la somera sezono.

ad 3) La daŭro de la malsano estas du ĝis tri semajnoj.

ad 4) La objektivaj signoj estas la samaj, kiel en Ruslando; bedaŭrinde la plilarĝigo de pupiloj neniel estas citata.

ad 5) La kuraciloj estas ankaŭ la samaj, kiel en Ruslando: bona nutrado, fiŝoleo, kuracado de la kserozo, indulgo al la okuloj.

ad 6) La samaj kaŭzoj kiel en Ruslando ankaŭ en Germanujo estas citataj. Ĉu la baciloj de kserozo ludas rolon en la etiologio de hemeralopio, ankoraŭ ne estas certe.

Ĝis kiu grado povas ekonomia organizacio de kuracistoj malakceli la dekadencan de nia ekonomia ekzistado?

De doktoro L. Skorscheban.

Estro de la „Ekonomia organizacio de la kuracistaro en Vien“.

La kaŭzoj de ekonomia dekadenco en kuracistaro estas diversaj. La ĉefaj kaŭzoj de proletariigo de la kuracista stato, precipe en urbegoj, estas unue la leĝo pri malsanulkasoj el la jaro 1888 kun envicigo

de monhavaj elementoj de la loĝantaro en la devigan asekuradon de malsanuloj kaj due, parte el tio ĉi sekvanta, entute ne konforme al la plinombriĝo de la popolo granda plimultiĝo de la studentoj de medicino. Sed

estus erare, se oni kulpigus nur la cititajn kaŭzojn pri la rapida ekonomia dekadenco de kuracistoj. Ankaŭ la indiferenteco de la registaro kaj de aliaj oficestraroj, kiuj estis ĉiam surdaj kontraŭ ĉiuj plendoj de kuracistaj korporacioj, estas ŝuldataj pri tio, ke la plinombro da kuracistoj vivas, anstataŭ kiel pli frue en bonstato, en zorgoplena ekzistado. Kaj ankaŭ ne kiel lasta cirkonstanco estu akcentita, ke la historia kaj jam proverba diseco kaj maltoleremo inter kolegoj ma'utulis des pli la situacion, ju pli ĝi estis el si mem ne kontentiga. Kaj eĉ pli! Kiam iĝis la mizero en kuracistaro plej altgrada, tiam disputo kaj malpaco en niaj rondoj atingis ne nur la plej altan gradon, sed plej bedaŭrinde ili manifestiĝis antaŭ la okuloj de la publiko, pro kio niaj malamikoj havis bonan okazon eluzi kontraŭ ni la situacion. La unuaj klopodoj pro organizo de kuracistaro estis malhelpataj per politikaj kaj religiaj diferencoj, enpenetrintaj ankaŭ en la rondojn de nia kuracistaro kaj malebligantaj tiel ĉiam unuecon.

Nur kiam la provincaj kuracistoj de malsupra Aŭstrio aranĝis la unuan fojon rezistencomovadon kaj turnis sin al la kolegoj en Wien pri eventuala monhelpo, nur tiam ekmontriĝis tie kaj ĉi tie ankaŭ en Wien iom da intereso por la afero kaj disvastiĝis iom post iom ankaŭ en la rezidencurbo, instigite el kelkaj centroj, la tendenco: unuigi kuracistaron sur ekonomia bazo.

Konsiderante, ke ekkomencis samtempe ankaŭ en aliaj kronlandoj de la regno Aŭstrio, t. e. en Bohemujo, supra Aŭstrio, Stirio, Karintio kaj Moravio la sama movado, la afero, kvankam ne promesanta en Wien grandan sukceson, tamen plu ne ripozis. Ĉiu konanto de la situacio en la rondo de Wien'aj kuracistoj (konsistanta el tro heterogenaj elementoj), devis ankoraŭ en la jaro 1906 konfesi, ke fondo de ekonomia organizacio ne estas esperebla. Tamen en aŭtuno de la sama jaro okazis la miraklo: la fondiĝo de ekonomia organizacio efektiviĝis kvazaŭ dum unu nokto. La 16-an de decembro okazis la fondiga kunveno en la ĉambrego de „Gesellschaft der Ärzte“ (Societo de kuracistoj). Kritike konsiderante la 4¹/₂ jaran funkciadon de tiu organizacio, fondita kun nesufiĉaj monrimedoj kaj kuniginta neorientitan anaron, oni devas konfesi, ke ĝi malgraŭ tio, ke ĝi ne estis komplete kaj ne disponis pri sufiĉe da mono, atingis tamen rimarkindajn sukcesojn kaj tial ĝi povas esti ŝatata kiel pruvo por absoluta neceseco de firma, unueca organizacio.

Mi volas per la sekvantaj ekzemploj kritike kaj objektivite ilustru la organizacion en Wien rilate al ĝiaj sukcesoj kaj malsukcesoj.

1) Jam en la komenco, t. e. en februaro 1907, sciigis la kuracistaro en Wien pri tre malagraba afero. La registaro intencis aranĝi en la nove konstruotaj klinikoj pagotajn apartaĵojn. Plenzorge, antaŭvidante certan malvenkon, estis la organizacio devigata komenci bataladon kontraŭ tiu nova projekto, kiu estus grave malutilanta kuracistajn interesojn. Dum kelkaj monatoj ni ne sciis, ĉu estos la fino de nia batalado venko aŭ malvenko. La lasta estis tiom pli supozebla, ke en la du ginekologiaj klinikoj, tiam preskaŭ pretaj, estis jam preparitaj ejoj por instalado de la pagotaj apartaĵoj. La juna organizacio atingis gloran venkon. La registaro forlasis la intencion pri instalado de tiuj apartaĵoj en la klinikoj, la ĉambroj, por ili destinitaj, estis aranĝitaj por aliaj celoj. Mi volas rimarkigi jam en tiu ĉi loko, ke la granda sukceso de la tiam ankoraŭ nekompleta organizacio elvokis altgradan intereson en kuracistaro.

2) La ordinejo de du specialistoj, okupataj ĉe unu el la plej grandaj malsanul-kasoj en Wien, estis malluita. Estu apude rimarkite, ke ili pagis la ejon el sia poŝo. Konsiderante, ke tempo kaj loko de la ordinado estis de la kasestraro precize fiksita kaj la du kolegoj, specialistoj por veneraj malsanoj, spite fervora serĉado ne trovis konvenan ejon, ili estis en granda embaraso. Tiutempe la malsanulkaso konstruigis propran domon. La kolegoj sciigis, ke en la subtera etaĝo de tiu domo troviĝos ĉambroj, kiujn la kaso ne bezonas kaj kiuj povus esti bone uzataj por la celoj de ordinado. La du kolegoj vizitis nun la kasestron, plendis pri sia malagraba situacio kaj petis, ke la koncernaĵoj estu donitaj al ilia dispono. Tiuj ĉi petoj estis malafable rifuzitaj. En ilia malespero la kuracistoj serĉis helpon ĉe la organizacio. Ili ricevis la konsilon, ke, ĉar estas ja nenio por perdi, ili avizu al la estraro de la kaso, ke ili estas, laŭ decido de la organizacio, devigataj starigi la jenajn postulojn: cedo de la loĝejo (pagata de la kaso) por ordinadaj celoj kun senpaga lumigado kaj hejtado, dungo de vartistino kaj du asistentoj, alie ili devus rezigni pri ilia posteno. Post ok tagoj estis ĉiuj postuloj de la du kolegoj plej afable plenumitaj.

3) En privata malsanulejo estis kolego, okupata ne nur kiel kuracisto, sed ankaŭ kiel definitive elektita administranto. Okaze de instalado de nova pli granda kaj luksa

malsanulejo kaj fermo de la malnova estis tre maloportuna al la estraro tiu duobla funkcio de la kuracisto (sekundario kaj administranto) kaj ĝi provis liberigi de la ĝenanta oficisto, komence bonanime kaj fine per disciplina procedado. Estas interese, ke la kolego tiam ekmemoris, ke ekzistas la organizacio, eĉ ke li estas ĝia ano, kvankam ne paginta ĝis tiam la kotizaĵon. Li sendis tuj la monon kaj vizitis post kvar tagoj la estron de la unuigo, por plendi pri sia afero. Tiu turnis sin jam la sekvintan tagon al la estro de la malsanulejo, petante permeson pri enrigardo en la disciplinajn aktojn. La peto estis plenumita kaj la delegitoj ekzamenis la plendojn, direktitajn kontraŭ la kolego. Antaŭ ol la kolego serĉis helpon ĉe la organizacio, li transdonis sian reprezentadon al advokato. La estraro de la malsanulejo trovis konvena interrilatiĝi antaŭ ĉio kun tiu jura konsilanto, proponante al la kolego kiel remuneracion 5.000 kronojn (aŭstr. monsis.) kaj fine estis alkoncentitaj 10.000 kronoj, ĉesigo de la disciplina procedado kaj eldono de bona certifikato.

La faktoj, sub 2) kaj 3) cititaj, pruvas, ke simpla interveno de la organizacio estis sufiĉa, por igi cedema la iom obstinajn kontraŭulojn.

4) En Wien ekzistas modela instituto, la mondfama: „Wiener freiwillige Rettungsgesellschaft“ (libervola societo por tuja helpado). Tiu disponas pri granda kapitalo kaj pri ĉiujare grandaj enspezoj. Ĝi estas ekvipita plej moderne, unuaklase, kun aŭtomobilparko provizita. Tamen la kuracistoj de la societo plendis, ke estas al ili eble plenumi iliajn taskojn nur per streĉado de ĉiuj fortoj, kvankam la ricevita salajro estas entute nesufiĉa. La organizacio prizorgis ankaŭ tiun ĉi aferon.

Post monatojn daŭranta batalado kontraŭ la societo ĝi estis kontentige aranĝita. La sukceso estis akiraĵo de 20.000 kronoj pli da salajro, dividita inter la helpkuracistoj de la societo.

5) Malgranda malsanulkaso subite ekigis, ne dirante la kaŭzon, unu el ĝiaj regionaj kuracistoj, kiu plenumadis la servojn por la kaso jam de sep jaroj. La eksigito petis la helpon de la organizacio, kiu intervenis ĉe la kasestraro, post kiam unue la kaso estis bojkotita. Estis sufiĉa unu interparolado por sukcesa aranĝo de la afero kaj samtempe akiro de gravaj profitoj por ĉiuj 24 kuracistoj de la kaso, nome de fiksa pozicio laŭ egale starigitaj kontraktoj. Nature estis la eksigo nuligita.

6) Regiona kuracisto de unu kaso estis eksigita sub la preteksto, ke li certe ne vo-

los ŝanĝi sian loĝejon, kio iĝis necesa pro administraciaj kaŭzoj. Kiam la estro de la organizacio vizitis la kasestron, por forigi la diferencojn, oni sciigis al li, ke la ofico jam estas fordonita al alia kolego kaj nenio plu estas farebla. Per interveno de la organizacio ankaŭ tiu ĉi afero estis bone finita.

7) La landestraro de malsupra Aŭstrio intencis preni en propran administradon la (ĝis nun ŝtatajn) malsanulejojn kaj klinikojn. La organizacio energie kontraŭbatalis t'un ĉi projekton, per kiu ne nur la humanecaj kaj por instruado de medicino destinitaj institutoj, sed ankaŭ la kuracistoj mem sendube estus subĵetitaj al politikaj influoj. La organizacio sukcesis interesi por la afero ĉiujn kompetentajn rondojn kaj instigi la kolegon de profesoroj al plej energia kontraŭstaro, per kiu la projekto, respektive ties definitiva decido, estis prokrastita.

8) En Wien ekzistas el privataj monrimedoj administrata naskejo por malriĉulinoj. Ties estraro intencis aranĝi pagotan apartaĵon. La organizacio tuj intervenis kaj sukcesis atingi, ke estas nur akceptataj tiaj monhavaj pacientinoj, kiuj havas certifikaton de iu kuracisto kaj la kuracadon prizorgas ne la kuracistoj de la instituto sed la kuracistoj, de la pacientinoj libervole venigitaj.

9) La ŝtataj helpkuracistoj petoskribis refoje sed sensukcese pri plialtigo de ilia salajro. Per interveno de la organizacio ili ricevis rimarkindan plialtigon tiel, ke ekzistas eĉ multaj praktikaj kuracistoj en la ĉefurbo, kies enspezoj ne estas tiomaj, kiel la enspezo de la sekundario aŭ asistento.

10) Estu fine preparolita ankaŭ la kazo, kvankam ne okazinta en Wien, sed kiu tamen havis senperan kunligon kun la ĉi tiea organizacio, ĉar ĝi koncernis kolegon en plej proksima regiono en malsupra Aŭstrio. Ankaŭ en tiu ĉi kazo estis la sukceso akirita per helpo de la Wien'a organizacio. Kolego, estante de 18 jaroj komunuma kuracisto kaj samtempe la kuracisto de tiea brikfabrika, estis iutage avizita de la fabrikestro, ke li devas transloĝiĝi en najbaran komunumon. La simpla kaŭzo por tiu ĉi postulo estis, ke oni volis per enloĝigo de la kuracisto rentumigi la malplene starantan domon de iu akciulo. Kvankam la kolego klarigis, ke lia loĝeja ŝanĝo signifus ne nur la perdon de lia pozicio, kiel komunuma kuracisto, sed ankaŭ de la rajto al pensiigo, tamen la fabrikestro persistis pri la postulo. La kolego estis eksigita kaj la organizacio bojkotis la oficon. Konsiderante, ke la fabriko povus el la proksima ĉefurbo (kvazaŭ el granda provizejo), facile

ricevi novan kuraciston, la organizacio devis energie klopodi, por ĝin malebligi. Per solidara kunagado de ĉiuj faktoroj sukcesis malhelpi, ke la fabriko ricevu kuraciston kaj post monatojn longa vana serĉado estis la fabrikestro fine devigata interkomprenigi kun la eksigito, kiu nun estis denove akceptita, sed laŭ kontrakto, en kiu estas ankaŭ la kondiĉo, laŭ kiu refoja eksigo estas ebla nur kun konsento de la kompetenta kuracista Ĉambro.

Estus ja eble daŭrigi la serion de samaj ekzemploj per ilustrado de aliaj faktoj, sed ĝi estas, laŭ mia opinio, superflua, ĉar la celo de tiu ĉi priskribado ne estas doni kompletan referaton pri la agado de nia organizacio en Wien, sed nur pruvi per kelkaj konvenaj ekzemploj, kian la organizacio havas signifon. Estas fakto, ĝenerale konata ne nur ĉe ni en Aŭstrio, sed preskaŭ en tuta Eŭropo, ke la ekonomia stato de la kuracistaro rapide malboniĝis. En la antaŭorganiza periodo restis la plej urĝantaj protestoj de la aŭstria kuracistaro nerespektitaj kaj la socia bonfarto estis prizorgata per helpo de nerekompencaj ko-

leĝoj. Instigite per la ĉiam pli kaj pli granda mizero, la kuracistaro kreis fine la aprobatan helprimedon: la organizacion. Tiu pruvis jam dum ĝia komenca tempo, ke ĝi estas la unika potenco por forigo de granda maljusteco de la nuna jarcento, kiu sin esprimas en nerespektado de plej primitivaj postuloj de la kuracistaro, kiel ankaŭ por restituo de la socia pozicio, kiun la kuracisto meritas laŭ sia senlaca agado por la bonfarto de la homaro.

Estas dezirinde, ke tiuj ekzemploj estu ĉie ŝatataj laŭ ilia merito, por ke baldaŭ malaperu la honto de nia jarcento t. e. kuracista proletario.

(Tradukis d-ro Sós).

Rimarko: Ni dankas tiun ĉi artikolon al la kolego, kiu estis iniciatinto kaj de post ĝia fondo estro kaj plej agema ano de la organizacio en Wien. La ĉi tiea kolegaro ŝuldas multan dankon al la meritplena kunbatalanto por kuracistaj sociaj interesoj. La Wien'a organizacio estas sendependa parto de la regna organizacio en Aŭstrio. (La tradukinto).

D-ro Séverin Icard (el Marseille).

Postmortaj operacioj sur vivaj personoj.

Faktoj, pruvantaj la danĝeron de la ŝajnmorto en hospitaloj.

(Ĉapitro II. de la mondfama verko de d-ro Icard, premiita en la jaro 1910 de la Pariza Akademio de sciencoj).

Tradukita laŭ permeso de la Aŭtoro.

(Daŭrigo).

Observaĵo. Ŝajnmorto de frenezulino, vekiganta ĉe la unua ektranĉo de la skalpelo en la amfiteatro de sekcadoj en la frenezulino en Malta.

„Jen kortuŝanta anekdoto, komunikita al mi de unu studento de medicino, kiam mi estis, kiel eksterulo, en la hospitaloj de Parizo. Mia kamarado estis grandkreska, forta junulo, ses piedojn alta. Lia bronzkolora vizaĝo estis sulkigita de cikatroj, kies originon mi ne konis. Li venis en Francujon por sin perfektigi en la studoj de medicino, ricevinte ĉiujn gradojn en la fakultato de Malta kaj tre avida de scienco, li frekventadis diligente la kurson ĥirurgian de d-ro Chassaignac en la hospitalo Lariboisière.

Renkontante nin reciproke ĉiutage ĉe la lito de malsanuloj, ni kunligis nin per amikeco kaj interparolis ofte pri la aferoj profesiaj post la vizito de la majstro.

Unu tagon, kiam mi petis lian helpon ĉe aŭtopsio, la Maltano diris al mi, kuintirante la brovojn.

— Ne sen emocio mi faras la unuan ektranĉon per skalpelo sur kadavro kaj mi rakontos al vi la kaŭzon de tio ĉi.

Antaŭ kvin jaroj mi apartenis al la servo kuracista de unu frenezulejo en mia lando. Frenezulino mortis nokte, kiel oni supozis, pro rupturo de aneŭrismo kaj ŝia korpo matene estas transportita al la amfiteatro. Car mi estis la sekvontan tagon ekzamenota pri la visceroj abdomenaj, mi iris sola en la ĉambregon de mortintoj, tenante lampo en unu mano kaj la instrumentan kesteton en la alia. Estis la deka horo vespere.

La individuo kuŝis nuda sur la tablo marmora. Mi eltiris la instrumentojn el la

skatoleto kaj stariginte la lampon sur la epigastro de la mortintino, por pli bone vidi, mi intencis malkovri la hepaton, kies sistemon arterian mi volis studi. Per certa mano mi komencis la ektranĉon. Tamen apenaŭ la pinto de la bisturo penetris en la karnon, kiam granda krio aŭdiĝis. La mortintino sidigis, jetante teren la lampon, kiu estingiĝis kaj mi eksentis ŝiajn ungojn, gratantajn mian vizaĝon, dum ŝia alia mano, malseka kaj malvarma kiel glacio, kaptis miajn harojn kaj frapadis per konvulsiaj movoj mian frunton kontraŭ la angulo de la funebra kuŝujo. Mi ne provos priskribi al vi la teruron de tiu baraktado. Mi estis freneza... mi kriegis pro doloro... kaj mia mano, armita per la skalpelo, frapis en malplenon; tamen subite la skalpelo trafis malhelpaĵon kaj mi sentis min liberigita de la terura premeĝo... ĝemo obtuza aŭdiĝis kaj mi falis sveninta teren.

La sekvintan tagon frumatene mi eksentis, ke iu skuas min ĉe la ŝultro. Ĝi estis gardisto de la amfiteatro, kiu demandis min, kio okazis kaj kio kaŭzis mian svenon.

Mia unua rigardo direktis sin sur la kadavron. La mortintino kuŝis sur la flanko kun sangmakulita abdomeno. Ŝia maldekstra mano prementis tufon da haroj, kiun ŝi estis al mi elŝirinta kaj la dekstra mano penis eltiri el la sino la skalpelon, kiun en mia konfuzo mi al ŝi enigis en la koron... Mi komprenis ĉion. Tamen mi ne volis diri la veron. (Citas Bouchut)³²⁾

Observaĵo. — Virino, deklarita mortinta, revenas al la vivo en la ĉambro de mortiintoj en la momento de la entombiga ceremonio.

En septembro 1905 oni akceptis en la hospitalon de Isco (provinco Brescia) virinon idohavan, nomatan Péa, por ŝin flegi en grava malsano. Malgraŭ sindonaj zorgoj de la kuracistoj post kelkaj tagoj Péa mortis. La morto estis konstatita, la dokumento pri tio ĉi pretigita, la mortintino vestita kaj lokita en la ĉambro de mortiintoj. La filinoj de la mortintino telegrafigis al sia patro, por anonci al li la gravan novaĵon. La sekvintan tagon matene, kiam la parencoj kaj konatuloj atendis la horon de enterigo, dum oficistoj de la funebraĵa entrepreno estis metontaj la korpon en la ĉerkon, oni aŭdis ĝemon kaj samtempe Péa malfermis la okulojn kaj rigardis mirigita ĉirkaŭ si. Oni ŝin tuj transportis sur la lito, kie ŝi plene rekonsciigis el la stato letargia, kiu kaŭzis, ke oni ŝin rigardis kiel mortintan.³³⁾

Observaĵo. — Malsanulo en la Pariza komuna hospitalo, kies litkarto, subskribita de internulo, enhavis la vortojn: morto konstatita, revenas al la vivo sub influo de malvarma bano. Trousseau alestis ĉe tiu ĉi fakto.

„De longe oni jam sciigadis el diversaj landoj, en kiuj ĥolero disvastiĝis, pri la danĝero de tro baldaŭaj enterigoj kaj pri la gravaj eraroj, kiujn povas kaŭzi en tiu ĉi malsano ŝajno de la morto. Unu el la plej interesaj kazoj, kiujn mi observis en la komuna hospitalo, konfirmas tiujn avertojn, tial mi petas vin ĝin dispublikigi, kiel ĝi tion ĉi, laŭ mi, meritas.

„Infano, ses aŭ sep jarojn aĝa, atakita de ĥolero, kuŝis en agonio, malvarma, kun malbrilaj okuloj, en unu el la litoj de la ĉambro de Saint Bernard en la komuna hospitalo. Sur ĝia litkarto enskribis internulo: la morto konstatita. Pro kelkaj aŭtomataj movoj en la regiono de la labioj oni penis la ideon trakti ĝin, kiel asfiksiulon, per malvarmo aŭ per longedaŭra bano. Oni ĝin transportis en banon je 14^o: ĝi esis tie ĉi lokita kiel senviva korpo; la kapon subtenis en la manoj hospitala servanto. Post kvin minutoj da masaĝado de la membroj en akvo la respirado komencis reaperi, la brustkesto sin dilatis, la naztruo oscilis. Post dek minutoj la respirado abdomena estis sentebla, ĝi fariĝis ĝenerala kaj alta. Post kvaronhoro la buŝo iom malfermiĝis, la infano oscedis, la palpebroj disiĝis; la okuloj reprenis iom de la brilo, kiun ili estis tute perdintaj. Laŭ nia unua ideo ni plialtigadis tre malrapide la temperaturon de la bano. Apenaŭ ĝi estis atinginta dudek du gradojn, kiam ni ekvidis, ke la respirado de la malsanulo plimalfaciliĝas kaj fine post kelkaj minutoj preskaŭ tute ĉesas. La indiko estis evidenta: oni devis malplialtigi la temperaturon de la akvo, por remeti la infanon en la unuajn kondiĉojn, kiuj tiom al ni prosperis. Laŭ nia atendo tio ĉi sukcesis; malvarmo dum kvin minutoj sufiĉis, por redoni al la infano la respiradon. Dume venis s-ro Trousseau, kiu jetŝprucigis malvarman akvon sur la vizaĝon de la malsanulo. Facila ĝemo, spirado pliprofunda, leviĝo de la palpebroj atestis tuj pri la viva sentado, kiun la infano havis. Denova aspergo faris ankoraŭ pli rimarkindan efikon. La infano movadis la membrojn kaj turnadis la kapon. Oni aŭdis la vorton malvarme sorti de ĝia buŝo. Apude estis seringo kaj venis al mi la ideo elpreni el ĝi la pistonon kaj plenigi per akvo malvarma la instrumenton. La ŝprucfluo de la akvo, sortanta per sia propra pezo el la tubo, estis direktata sur la frunton de la infano, kiu eksentis vivan impreson. Mia Dio,

³²⁾ En *Les Signes de la mort*. Paris 1883 p.94 kaj 95.

³³⁾ Tiun ĉi observaĵon komunikis al mi s-ro Guasco Gio. Vincenzo, estinta subprefekto en Sainte-Marguerite, Ligurie.

kiel malvarme, ĝi diris. Baldaŭ poste ĝi povis sidiĝi kaj trinki dufoje post aspergado dum dudek minutoj per tiu sama maniero, kiun oni interrompdis de tempo al tempo, por sekigi la infanon per sekaj tukoj. La infano jam reakiris iom da fortoj, ĝi helpis al si per la manoj, por ŝirmi la vizaĝon kontraŭ la fluo de la akvo, kiu ĝin ĝenis. La koro batadis, la cirkulado estis sentebla, la piedo, kunpremita super la kruro, fariĝis rozkolora. Frapante per la manplato sur la femuron, oni aperigis ĝian ruĝiĝon, la koloro de la vizaĝo estis kontentiga. Ni pensis, ke ni povas ĝin transporti en la liton. La unua ekzemplo de asfiksio, kaŭzita per ekstera varmigo, kiun ni estis vidintaj antaŭ nelonge, ne prezentis sin al nia penso. La infano estis envolvita en varman kovrilon kaj kuŝigita en la lito. La spirado baldaŭ malfaciliĝis kaj post du minutoj la infano ĉesis vivi. Oni ĝin denove transportis en banon, tamen sen sukceso. Enmeto en malvarman akvon ne povis plu efiki sur kadavron... (Citas Pigeaux)³⁴.

Observaĵo. — Malsanulo en la hospitalo de Charité en Paris, deklarita mortinta de la profesoro Andral, estis revivigita per artefarita respirado.

En decembro 1854 viro dudek unu jarojn aĝa, kuŝanta sur la lito n-ro 5 en la ĉambro Saint-Felix (Charité, apartaĵo de s-ro Andral) estis akceptita pro epistakso ripetiganta kaj tre abunda, kiu lin faris anemia. Unu matenon li eksentis doloron en la dekstra flanko, tiel fortan, ke oni ne povis ektuŝi lian abdomenon, ne provokante liajn akrajn kriojn. Samtempe ekzistis sinĵetado, maltrankvileco, sed neniom da febro. Por konvinkiĝi, ĉu tiu ĉi doloro devenis el iu lezio, aŭ ĉu ĝi estis nur sentado trograndigita pro la timo, kiun al la malsanulo kaŭzis ĥolero, kies kelkaj kazoj tiam en la sama ĉambro estis, oni submetis lin en ĉeesto de s-ro Andral al inhaladoj de ĥloroformo. Li estis en la pozicio duonsida, apogita sur kusenoj, alte kuŝigitaj (tiun ĉi pozicion li ĉiam konservis pro sia granda kresko). La unuaj inhaladoj estis senefikaj kaj oni estis devigitaj apliki al li tri fojojn sub la nazon kompreson, malsekigitan per ĥloroformo, ne malhelpante tamen aliron de aero. Dum tiuj ĉi procedoj li subite estis kvazaŭ fulmofrapita. La spirado haltis, la pulso fariĝis neperceptebla, fine la korbatado ne estis plu konstatebla per la orelo. Oni uzis ekscitadon per akvo malvarma, pinĉado de la haŭto k. t. p. S-ro Axenfeld

enprofundigis kelkajn fojojn siajn fingrojn en la superan aperturon de la laringo (laŭ indikoj de s-ro Monod), sed ĉio estis senutila. S-ro Andral havis la feliĉan ideon fari respecon de artefarita respirado per alterna kunpremo kaj relasado de la abdomenaj kaj brustkestaj parioj. La malsanulo ne revivigis kaj s-ro Andral diris jam: „Li ne estas pli viva, ol la kadavroj en la amfiteatro“.

Tamen danke al sindonemo de s-roj doktoroj Axenfeld kaj Lacaze, kiuj ne ĉesis fari tiaspecan respiradon artefaritan, la malsanulo fine post kvin minutoj faris mallongan enspiron, kiun sekvis alia nur post kelkaj sekundoj, poste la respirado reguliĝis. Tamen dum unu horo ekzistis deliro kaj konvulsioj kvazaŭ tetanaj: la pulso restis malgranda kaj regula (Citas Duchesne de Boulogne).

Observaĵo. — Indiano estis deklarita kiel mortinta en la hospitalo de Calcutta kaj aŭtopsiata ses horojn post lia transporto al la amfiteatro de la fakultato de medicino: la batado de la koro persistis, kion oni senpere konstatis ĉe la malfermo de la torako.

La 1-an de februaro 1861 oni alportis el la civila hospitalo de la fakultato de medicino en Calcutta, por fari aŭtopsion, la korpon de unu Indiano, en la aĝo de ĉirkaŭe 25 jaroj. La transporto al la amfiteatro okazis je la 6 matene kaj ĉirkaŭe je la 7 oni faris la injekton de la solvaĵo arsenika en la arteriojn. Je la 11 horo la prosektoro malfermis la torakon kaj la abdomenon, por sekci la nervon simpatikan. Tagmeze s-ro Macnamara vidis klare, ke la koro batas. Ekzistis movo vermikulara regula de la vestibulo kaj de la ventrikulo dekstraj. La perikardo estis malfermita kaj la koro nudigita en sia natura pozicio maldekstre. La agado de la koro, kvankam regula, estis tre malforta kaj malrapida. La vestibulo maldekstra ankaŭ funkciis, sed la ventrikulo maldekstra estis kuntiriĝinta kaj rigida kaj ŝajnis senmova. Tiuj ĉi sistoloj spontaneaj daŭris ĝis la 12 horo 15 minutoj kaj eĉ post tiu ĉi horo la flanko dekstra de tiu ĉi organo kuntiriĝis sub la influo de stimulilo, ekzemple skalpelo kaj tio ĉi daŭris ankoraŭ dum unu kvaronhoru.

Tiun ĉi fakton rakontis la ĥirurgo de brigado W. Curran kaj citas ĝin William Tebb kaj Vollum³⁵). Kiel ni diris pli supre, la persisto de korbatado, konstatita ĉe la malfermo de la brusto ne pravas, ke oni aŭtopsiis vivantan homon; tamen aliflanke ne-

³⁴) En *Gazette médicale de Paris* vol. 3. n-ro 15 de 5-a aprilo 1832. p. 155.

³⁵) *Loc. cit.* p. 236, laŭ la Heath, May, 21 septembro 1886 p. 121.

nio pruvas en simila okazo, ke oni aŭtopsiis mortintulon. La homo, pri kiu temas, estis en la amfiteatro de ĉirkaŭe sep horoj, kiam la korbatoj haltis; li estis transportita el la civila hospitalo, do la morto antaŭvenis je sufiĉe malproksima horo. Pro tiu ĉi tiom longdaŭra persistado de la korbato, konstatita tiel longtempe post la momento de la supozata morto, oni rajtas demandi, ĉu tiu ĉi koro, kuntiriĝanta ankoraŭ kiel simpla histo muskola en la momento de la aŭtopso, ne kuntiriĝadis efektive kiel organo centrala de la cirkulado en la momento, kiam la bedaŭrinda Indiano, deklarita mortinta, dum li estis eble ankoraŭ vivanta, estis transportita en la amfiteatron, versimile sen iu ajn esploro.

Observaĵo. — Vundita homo, deklarita mortinta sur la operacitablo, revenas al la vivo en la hospitalo de Sankta Josefo en Youkers.

Edw. Mc. Elroen ricevis en 1907 frapon sur la kapon en la strato de Youkers (Westchester-County): el tio ĉi rezultis frakturo komplikita de la kranio. La vundito estis transportita en la hospitalon de S-ta Josefo en tiu ĉi urbo. Dum li estis sur la operacitablo, li falis en la staton de ŝajnmorto. Oni perceptis ĉe li nek korbataĵon, nek respirajn movojn kaj ĉiuj penadoj, kiujn oni faris, por lin revenigi al la vivo, restis sensukcesaj. Oni lin deklaris mortinta kaj donis ordonon forigi la kadavron: unu hospitala servantino, preterpasante, rimarkis tremadon de muskoloj sur unu el la kruroj de la supozata kadavro. Esplorante lin pli detale, oni ekvidis analogian tremadon de la torakaj muskoloj. Tiam oni faris envejan injekton de la normala solvaĵo de la mara salo kaj oni rekomencis la procedojn de la artefarita respirado. Iom post iom la koro denove komencis bati kaj respirado reaparis. Post dutagaj senĉesaj flegoj la malsanulo rekonsciigis. Li restis en la hospitalo sep semajnojn kaj eliris resanigita (Jurnaloj medicinaj de la jaro 1907).

Observaĵo. — Ŝajna morto: spontanea reviviĝo en la momento de la aŭtopso (Hospitalo de New-York).

En la monato majo 1864 unu homo mortis subite en hospitalo de New-York kaj ĉar la kuracistoj ne povis klarigi al si la kaŭzon de la morto, ili decidis fari aŭtopsion. Ĉe la unua ektranĉo de la skalpelo la supozata mortinto revekiĝis kaj baldaŭ komplete revenis al la vivo (Citas d-ro P. Hartmann).³⁶⁾

Observaĵo. — Malsanulo reviviĝis en la ĉambro de mortintoj kaj vivis ankoraŭ du tagojn (Komuna hospitalo en X...).

La fakto okazis en 1886 en la komuna hospitalo en unu tre granda urbo, kies nomon ni prisilentos pro insisto de la ĉeestsinto, kiu al ni komunikis tiun ĉi observaĵon. Unu malsanulo el la ĉambro de februloj estas kiel mortinta transportita en la ĉambron de mortintoj, sed baldaŭ oni ekrimarkis, ke li donas signojn de vivo, rekuŝigis lin en la liton kaj li vivis ankoraŭ du tagojn.

Observaĵo. — Malsanulo el la hospitalo de St-Julien de Savol (Canada) reviviĝas post kiam li estas per du fojoj deklarita de la ĉefkuracisto kiel mortinta.

La frato Célestin Guillet de la kongregacio de Oferuloj (Oblats), hodiaŭ (1909), aĝa 67 jarojn kaj loĝanta en la Misio apud la lago Muskey en la eparĥio de Prince Albert, estis atakita de variolo en 1867 kaj transportita en la hospitalon de St. Julien-de-Laval, kiun subtenas la monaĥinoj de St. Vincent de-Paul. Li havis la liton n-ro 17. Post kelkaj tagoj li ŝajnis morti kaj oni lin konsideris mortinta. En la momento de la vizito la kuracisto alproksimiĝis al li kaj post esploro diris al la fratino deĵoranta: „La n-ro 17 mortis, bonvolu lasi lin envolvi“. Kiam la fratino alvenis, por lin envolvi, ŝi konstatis restaĵon de la vivovarmo, havis do dubon pri la realeco de la morto kaj ŝi prokrastis la envolvadon spite la opinio de alia fratino, kiu deklaris: „Li vere estas mortinta, ĝi estas nedubebla“. La sekvintan matenon alvenis denove la kuracisto kaj li montris grandan miron, kiam li ekvidis la supozatan mortinton ankoraŭ sur sia lito. „Ĉu vi do — li diris al la fratino — volas fari relikvojn de la n-ro 17?“ La fratino eldiris sian timon kaj la kuracisto ne insistis pri senprokrasta enterigo kaj lasis la aferon. Ĉirkaŭ la 5—6 horo posttagmeze la saman tagon la supozata mortinto ekkriis: li revenis al la vivo kaj post kelkaj semajnoj li forlasis la hospitalon tute resanigita.³⁷⁾

Observaĵo. — La infanoj, trovitaj vivaj en la sino de la patrino en la momento de la aŭtopso (La hospitalo de S-ta Antono en Paris kaj la hospitalo de S-ta Bartolomeo en Palermo).

D-ro Kergaradec, membro de la Akademio de medicino, raportis la sekvantan fakton, kiun li persone observis. „En 1807, li diras, kiam mi estis kuracisto internulo

³⁶⁾ F. Hartmann: *Enterré vivants*. Leipzig 1895 p. 80.

³⁷⁾ Ni ricevis tiun ĉi observaĵon de monsinjoro Emile J. Legal, episkopo de Saint-Albert. „Ĉiujn detalojn — li konfirmas — donis al ni la frato G. Guillet mem la 28-an de februaro 1909“.

en la hospitalo de S-ta Antono en Parizo, virino graveda mortis. La sekvintan matenon post la vizito ni iris en la amfiteatron. Oni faris malfermon de la abdomeno kaj eltiris infanon, al kiu ni havis feliĉon doni la bapton“.

Xavier Henri, ĥirurgo de la hospitalo de S-ta Bartolomeo en Palermo, malfermite la ventron al la malsanulino, kiu mortis jam antaŭ dudek kvar horoj, trovis filinon vivantan, kiu estis baptita.³⁸⁾

En tiuj ĉi ambaŭ kazoj la longtempa postvivo de la infano pruvas evidente kiel ni diris pli supre, ke la patrino ne estis mortinta en la momento, kiam oni estis ŝin transportinta en la ĉambron de mortintoj. Tie ĉi estas duobla eraro de la diagnozo: la kuracisto eraris samtempe pri realeco de la morto de la patrino kaj pri realeco de la morto de la infano.

Observaĵo. — Tri infanoj, trovitaj de Bouchaud en la amfiteatro en stato de ŝajnmorto (la hospitaloj Parizaj).

Bouchaud tri fojojn trovis vivaj en la amfiteatro la infanojn, kiujn oni estis aŭtopsiontaj kaj kiujn inancio longedaŭra metis en la staton de ŝajna morto. „La eraro — diras la aŭtoro — estas tre facila. Ĉio anoncas la morton: malvarmo, senmoveco, sen-senteco, kelkfoje rigideco. Se oni ne esploras ekzakte, oni ne povas eviti la eraron. Tamen se oni senvestigas la infanon kaj ĝin observas kelkajn momentojn, oni rimarkos la eraron. Pinĉado kelkfoje elvokos movon tre malrapidan kaj mallaŭtan krion plendan kaj tre dolĉan. Tamen kelkafoje nenio aperas. Tiam oni devas fiksi la rigardon al la insertoj de la diafragmo pro la malrapideco de spirado kaj kelkafoje atendi unu minuton aŭ pli longe. La koro donas malmulte da indikoj. Oni apenaŭ aŭdas konfuzan bruon kaj nenian precizan batadon“.³⁹⁾

Observaĵo. — Infano novnaskita, forlasita kiel mortinta, revenas al la vivo en la akuŝiĝejo de Paris.

„Infono troviĝas aparte metita inter la kadavroj de la mortnaskituloj, ĉar ĝi donis neniun signon de vivo. Ĉe nia esploro kune kun s-ino Legrand, ĉefa akuŝistino de la Maternité, ni perceptas batojn de la koro kaj post tiuj indikoj de la vivo ni revekas al la vivo la infanon post du horoj de ŝajnmorto. Ĉar la infano naskiĝis antaŭ la lim-

tempo de la gravedeco, ĝi baldaŭ mortis“.
(Citas Deschamps)⁴⁰⁾.

Observaĵo. — Infanon novnaskitan revekas al la vivo profesoro Portal en la Pariza amfiteatro en la momento de aŭtopσιο.

Oni alportis unu tagon al Antono Portal infanon, naskitan en asfiksio. La kadavreto estis jam de kelka tempo en lia amfiteatro, kiam li preiĝis por ĝin sekci. Tamen en la momento, kiam li intencis komenci la operacion, venis al li la feliĉa ideo blovi al ĝi dum kelka tempo aeron en la bronkojn. Post 2–3 minutoj la infano estis revivigita. Simila fakto estis observita de unu anatomiisto de Lyon, kiu ĝin komunikis al la barono Portal. Depaul parlas pri tiu ĉi fakto: li ĝin aŭdis de Portal mem.⁴¹⁾

b) La hospitaloj militistaj.

Observaĵo. — Militisto revenas spontanee al la vivo en la momento, kiam la ĉefkuracisto estis lin deklarinta mortinta kaj ordonis transporton de la kadavro en la kadavrejon de la hospitalo de Grenoble).

Tiu ĉi kazo koncernas Bernadotte'n en junago, kiam li estis ankoraŭ simpla soldato aŭ suboficiro. Ĝi troviĝas priskribita en la historio de tiu ĉi generalo, verkita de B. Sarran⁴²⁾ kaj estas al ni indikita de d-ro Callamand (el Saint-Mandé).

„La patro Elisée, la sama, kiu en la tempo de Restaŭracio, estis nominita ĥirurgo ordinara de Ludoviko XVIII., farante unu matenon la viziton kuracistan en unu el la ĉambregoj de la hospitalo en Grenoble, alvenis al unu malsanulo, kiu ne prezentis plu iun ajn signon de vivo. La kuracisto palpas la pulson: ĝi ne batas plu; li esploras la koron: ĝiaj pulsadoj ĉesis; li levas unu brakon, kiu refalas malvarma kaj rigida sur la liton. Tiam konvinkita, ke ĝi estas nur kadavro, la patro Elysée ordonas transporti ĝin en la kadavrejon kaj pasas al alia lito. Tamen post la patro Elisée iris juna ĥirurgo, s-ro Villars, kiu, sendube intencante fari eksperimentojn sur la mortinto, donis al la hospitalaj servistoj la signon, ke ili transportu Bernadotte'n en lian divizion, kie post kelkaj momentoj li trovis lin reviviginta el la sinkopo, konsiderita de la unua kuracisto kiel morto“.

Observaĵo. — Militisto en la stato de ŝajnmorto revenas spontanee al la vivo dum la

³⁸⁾ Tiujn ĉi du observaĵojn citas d-ro Debreyne en *Maechiologie*, Paris 1847. p. 451 kaj 452.

³⁹⁾ Bouchaud: *De la mort per inanition et études experimentales sur la nutrition chez le nouveau né*. Tezo de Paris 1864.

⁴⁰⁾ Deschamps, *loc. cit.* p. 41 kaj 42.

⁴¹⁾ Depaul en *Dict. de Sciences Médicales*, volumo 65, parto 2-a, p. 588.

⁴²⁾ *Histoire de Bernadotte*, 2 volumoj en 8-o, 1545. Vol. I. p. 3.

aŭtopso en la amfiteatro de la hospitalo de Bey en Alĝero (Observaĵo ĝis nun ne eldonita).

Marseille 9 de marto 1902.

„Dum unu kunveno de la Societo por psiĥikaj studoj en Marseille venis sur la tagordon la demando pri la antaŭtempaj enterigoj. Mi komunikis la sekvantan fakton, pri kiu d-ro Icard, mia kolego, petis ke mi skribe raportu. Jen ĝi estas en resumo:

Antaŭ ĉirkaŭe dudek aŭ dudek kvin jaroj mi renkontis hazarde unu el miaj malnovaj kamaradoj, s-ron F..., vestitan al mia granda miro per la robo de pastro. Kiam mi lin demandis pri la kaŭzo de tiu ĉi transformiĝo, li rakontis al mi kio sekvas:

„Dum la milito de 1870 envicigita kiel rekruto en la artilerion, li estis sendita en Afrikon, malsaniĝis kaj venis en la hospitalon militistan de Bey kun la diagnozo: febro tifoĵda. Li deliris senĉese. Unu tagon oni lin deklaris mortinta kaj transportis en la amfiteatron, kie li pasis nokton tute nuda sur la marmora tablo, atendante la aŭtopson. Matene la kuracisto submajoro, kiam li alproksimigadis la skalpelon al la kadavro, kredis percepti ekĝemon, esploris ekzakte la korpon kaj ricevis dubon pri la realeco de la morto. F... estis senprokraste transportita en la ĉambron kaj baldaŭ rekonsciigis.

„Mi substrekas tiun ĉi fakton, kiun al mi F... sciigis, nome ke li estis havanta plenan konscion, de tempo neprecizigebla, kiam li ekvidis la kuraciston, alvenantan kun sia instrumentujo, tamen estis al li neeble anonci sian staton de vivo per alia maniero, ol nur per neperceptebla ĝemo.

„Frapita de tiu ĉi eksterordinara aventuro, en kiu li kredis vidi eksternaturan intervenon, per sekvo de ideoj, facile komprenebla, li sin donis al studoj religiaj kaj definitive sin al ili dediĉis.

„Li diris al mi la nomon de la malgranda vilaĝo, kie li estis paroĥestro, tamen mi ĝin ne memoras kaj ne aŭdinte de tiu tempo pri li, mi ne povas doni informojn pli detalajn, kiuj povus konduki al preciza esploro de la fakto. Mi ĝin tre bedaŭras, ĉar mi tion vidas, ke tiu ĉi fakto pro manko de detala esploro, perĉesanta verigi ĉiujn ĝiajn cirkonstancojn, eble ĉe la legontoj ne faros la saman impreson, kiel ĝi faris sur min“.

Subskribite:

D-ro Goudard

estinta kuracisto militista.

Observaĵo. — Militŝipano ŝajne morta reviviĝis spontanee en la momento, kiam oni lin metis en la ĉerkon en la hospitalo de Guadeloupe.

La sekvanta fakto okazis al unu el niaj klientoj, dum li servis kiel suboficiro sur la

ferdeko de unu ŝtata ŝipo. Li vivas hodiaŭ en Marseille en plena uzado de sentoj. Ĉetero li estis tiom frapita de la okazintaĵo, ke li konservis ankoraŭ hodiaŭ sendifektan rememoron pri ĝi, tute tiel, kvazaŭ se la fakto estus okazinta hieraŭ.

Tiu ĉi ŝipisto en 1856 veturis el Toulon al Martinique sur la fregato *Ifigenio*, komandata de la admiralo Duquesne. „Dumvoje, post kiam oni alboridiĝis por kelka tempo en Havane, aperis sur la ŝipo epidemio de la flava febro. Ĉiutage oni ĵetadis en maron la kadavrojn de kvin aŭ ses viktimoj. De la personaro, kalkulanta 500 membrojn, ni restis nur 150. Post alveno al Guadeloupe la malsanuloj estas transportitaj en hospitalon kaj ĉar mi laŭvice sentis min elĉerpita, oni min tien kondukis, kiel la aliajn. Kiam mi venis, oni min kuŝigis en liton. Kiel havaĵon mi posedis nur zonon ledan, kontenantan kelkajn centojn da frankoj kaj sur la fingro mi portis sigelringon. Ni estis je dek mejloj de Martinique. La kuracistoj, konsiderante min tre malsana, opiniis konvene min sanktoleumi. La sekvintan tagon mi prezentis neniun signon de vivo kaj kredante min mortinta, oni kovris mian vizaĝon per tuko, kiel ĝi estis kutimo, kiam iu mortis. Dum la vizito kuracista, konvinkitaj, ke mi estas mortinta, oni min prenis, por meti min en ĉerkon, tamen en tiu momento mi faris ekmovon kaj oni rekonis, ke mi vivas ankoraŭ kaj metis min denove sur la liton. La kuracisto min esploris kaj konstatis la eraron. La negroj, supozante min mortinta, jam forŝtelis al mi la zonon kaj la ringon, kiun mi portis. Iom post iom mi rekonsciigis, post kelkaj tagoj mia sano pliboniĝis, baldaŭ mi estis sur la vojo al resaniĝo kaj reakirinte plene la sanon, mi revenis sur la ferdekon“.

Observaĵo. Ŝajna morto ĉe militisto sekve de falo sur la kapon. Spontanea reviviĝo en la ĉambro de mortintoj de la hospitalo en la momento, kiam ĥirurgoj, konvinkitaj pri la morto, serĉis la kaŭzon de la morto.

„Soldato indiĝena, apartenanta al la 7 regimento de kavalerio, en 1878, portante depeŝojn al Nowshera, estis deĵetita de sia ĉevalo kaj falis je la kapo sur akropintan ŝtonon de la vojo. Li ruliĝis sur la dorson kaj estis trovita en tiu ĉi pozicio post ĉirkaŭe ses aŭ sep horoj. Oni lin transportis en la ĉambron de mortintoj de la hospitalo eŭropa; liaj membroj estis tute flakcidaj. La hemoragio estis tre negranda. La ŝtono estis ankoraŭ enigita en la osto frunta. Nek korbatado nek respiraj bruoj estis percepteblaj. La membroj komplete rigidigis kaj oni vidis klare grandan kvanton da ma-

kuloj pro dekompozicio. Oni neniun povis konvinki, ke tiu ĉi homo vivas. La ĥirurgoj majoroj Hunter, Gibson kaj Buggs, kiel ankaŭ la farmaciisto S. Pollock kaj ĥirurgo asistento J. Levis, ankaŭ mi mem, estis certaj, ke li efektive mortis. Ĉar en la armeo oni estas ekstreme detalema pri la aferoj, kiuj koncernas la kaŭzon de morto, la ĥirurgo majoro Hunter forigis la ŝtonon kaj la fragmentojn de la ostoj frunta (antaŭ ol li estis skribonta la ateston pri la morto), kiam al nia granda surprizo la kadavro fermis la okulojn, kiuj estis malfermitaj en la momento, kiam estis alportita la kadavro. Sekvis malgranda hemoragio seroza. Vidante tion ĉi, oni decidis operacii per trepano, ne uzante tamen ĥloroformon kaj oni forigis ankoraŭ aliajn fragmentojn de la ostoj, kiel ankaŭ grandan koagulaĵon de la sango, kiu premis sur la cerbon kaj kiam la soldato dum tiu ĉi operacio kelkajn fojojn ek-tremis, oni enverŝis al li en la buŝon korekscitan medikamenton kaj transportis lin en la hospitalon regimentan, de kie li eliris post ses kaj duono monatoj komplete sanigita. Pli poste li eĉ faris ekspediciojn en Egipton kaj Afganistanon⁴³⁾.

Observaĵo. Oficiron, deklaritan mortinta de la ĉefkuracisto en la hospitalo militista en Krems (Aŭstrio malsupra), rekonas juna ĥirurgo kiel vivantan en la momento, kiam oni intencis deĵeti el la fenestro la kadavron.

„En 1809 s-ro M. X... farmaciisto majoro troviĝis kune kun la ambulanco, kies li estis ano, en Krems, urbo de la Aŭstrio malsupra, kuŝanta apud la bordo de la rivero Danubo. En unu bataleto li ricevis en media parto de la antaŭbrako sabrofrapon, kiu distranĉis la arterion radialan. Mi devas tie ĉi rimarkigi, ke ĝi estas la arterio, kiu plej ofte palpas kuracistoj, por esplori la pulson de la malsanuloj. La vundo rapide cikatriĝis, sed ĉar la cirkulado estis parte interrompita, rezultis de tio ĉi komence en la membro infiltraĵo, kiu sufiĉe longe persistis, kaj krom tio la pulsado ne estis plu sentebla en la malsupra parto de la distranĉita arterio, t. e. en la regiono de la karpeo. Post kelka tempo aperis epidemio en la hospitalo kaj baldaŭ vastiĝadis kun tia forto, ke la mortintoj seninterrompe unu post alia sekvis.

„Fine venis momento, kiam la ĉambrego de mortintoj ne plu sufiĉis kaj oni estis devigataj provizore deĵetadi la kadavrojn tra la fenestro en malgrandan korton ĝis la momento de ilia enterigo. Cetere

pro ilia restado en la korto nenio estis timinda, ĉar oni estis en mezo de la vintro severa kaj la kadavroj kuŝis tie ĉi nur tre mallongan tempon. S-ro X... ne forkuris antaŭ la malsano kaj estis transportita en la ĉambron, kie jam kelkaj malfeliĉuloj ĝemis. Malgraŭ la plej zorga kuracado la malsano tre rapide progresadis. Unu matenon la kuracisto, farante la viziton, trovis s-ron X... senvarma kaj senspira. Li prenis tiam la dekstran manon de la malsanulo kaj serĉinte senrezultate la pulson arterian, li deklaris lin mortinta kaj ordonis al la servantoj forporti la kadavron.

„Ili tuj obeis al la ordono ricevita kaj jam alproksimiĝis al la fatala fenestro, tra kiu ili estis deĵetontaj la malfeliĉulon, al kiu certe la falo kaj malvarmo forrabus la ekziston, kiun al li lasis la malsano, kiam aperis juna ĥirurgo kaj demandis la servantojn, kiun ili portas. Ĝi estas — ili respondis — la n-ro 4-a el la ĉambro de oficiroj. Laŭ tiu ĉi indiko la ĥirurgo rekonis sian amikon; li sublevis la tukon, por lin rigardi la lastan fojon; poste li volis certigi mem pri la realeco de la morto. Tamen sciante pri la malnova vundo de s-ro X... kaj pri la sekvoj, de ĝi kaŭzitaj, li prenis lian maldekstran manon, serĉis la arterion kaj baldaŭ sentis kelkajn malfortajn pulsaĵojn. Li ordonis tuj reporti la malsanulon en la liton, ĉirkaŭigis lin per zorgoj kaj post kelkaj tagoj li havis la ĝojon vidi lin resanigita“.

Tiun ĉi fakton rakontis al Lenormand la heroo mem, la farmaciisto majoro X... Ni ĝin citas laŭ la aŭtoro, kiu garantias ĝian tutan aŭtentikecon.⁴⁴⁾

Observaĵo. Militisto, deklarita mortinta kaj senprokraste transportita en la amfiteatron, reviviĝas post dek horoj en la momento de la aŭtopso.

„Soldato, alvenanta el Ameriko, eniris en la hospitalon de en 1764; ĉirkaŭ la fino de decembro de la sama jaro li falis inter dekunua kaj dekdua horo nokte en tiom malbonan staton, ke oni lin kredis mortinta. Oni lin tuj transportis en la amfiteatron, kovrinte lin per tuko; ĉirkaŭe post dek horoj la frato J...., kiu devis fari lian aŭtopsion, venis tien kune kun la frato T..., s-ro Baubeau kaj s-ro Doublet, ĉefĥirurgo Pariza. La frato J.... apenaŭ faris entranĉon supraĵan sur la brusto de la malfeliĉulo, longan je larĝo de kelkaj fingroj, kiam tiu ĉi donis signojn de vivo, sed post kelkaj minutoj li denove falis en la saman sta-

⁴³⁾ Tiun ĉi observaĵon komunikis d-ro Chew al William Tebb kaj Vollum, kiuj ĝin citas en sia verko: *Premature burial*, London, 1896, p. 90 kaj 91.

⁴⁴⁾ Lenormand: *Des inhumations précipitées*, Macon 1844, p. 106.

ton. Estus malfacile pentri la miron de la kuracistoj, kiun kaŭzis tiu okazintaĵo. Ili esploris la bedaŭrindan homon kun tuta ebla atento kaj trovis ankoraŭ fajron de vivo. Ili lin kuŝigis en varmigita lito kaj helpe de la zorgoj, kiujn ili faris, havis la feliĉon lin revivigi. Tamen li ne longe ĝuis la vivon kaj mortis post du semajnoj. Tiu ĉi malfeliĉulo promenadis du tagojn post tiu ĉi akcidento; li eĉ ludis je kartoj kun siaj kamaradoj kaj leviĝadis el la lito ĉiutage ĝis sia morto. Tiun ĉi fojon oni lin observis 48 horojn, antaŭ ol la aŭtopso estis farita“. (Citas Ganal).⁴⁵⁾

(Observaĵo. Hospitala servanto, deklarita mortinta, reviviĝas spontanee en la ĉambro de mortintoj en la hospitalo militista en Cassel.

⁴⁵⁾ Ganal: *Mort réelle et mort apparente*, Paris 1868, p. 240.

„Dum mi estis en Germanujo, diras Durande,⁴⁶⁾ servanto hospitala, helpisto farmacia de la hospitalo en Cassel, ŝajnis esti mortinta. Oni lin portis en la ĉambron de mortintoj, kie li estis envolvita en tukon. Post kelka tempo, reviviĝinte el la letargio, li rekonis la lokon, kie oni lin lasis. Li trenis sin ĝis la pordo, kiun li frapis per siaj ambaŭ piedoj. La bruon feliĉe aŭdis gardoŝtaranto, kiu, ekvidinte la movon de la tuko, alvokis helpon. Oni transportis la agonianton en liton varman kaj mi vidis, ke tiu ĉi homo ĝis la paco kontinuus sian hospitalan servon. Se li estus kunpremita per bendoj kaj malvastigantaj ligaĵoj, li ne povus sin aŭdigi; liaj senrezultataj penoj faligus lin en novan sinkopon kaj li estus enterigita viva“.

⁴⁶⁾ Durande: *Memoire sur l'abus de l'ensevelissement des morts*, Strassburg 1780, p. 68.

Partopreno de kuracistoj en dueloj.

(Enketo internacia).

(Daŭrigo).

Francujo.

16.

(Originalo franca).

Dro René Felhoen,

4 Boulevard de Cambrais, Roubaix.

En la „Presse Médicale“ mi legis Vian demandaron pri partopreno de kuracistoj en dueloj.

Kvankam mi ne estas partiano de la duelo, kiu ne pruvas nek iam ajn pruvis, ke la venkinta duelinto estis prava, mi devis antaŭ kelkaj semajnoj asisti, kiel kuracisto, al unu al miaj kamaradoj, kiu estis publike grave ofendita. Do, konante la aferon, mi eldiros mian modestan opinion kaj respondos la diversajn demandojn, kiujn Vi faras.

Mi pensas, ke la kuracisto ne ofendas sian devon, kiam li akceptas inviton al la duelo, tamen nur en tia kazo, se la duelo estas motivita en maniero serioza. Mi aldonas, ke en tia kazo la kuracisto neniam devas postuli pagon por sia peno, kio bedaŭrinde ne ĉiam fariĝas.

La kuracisto, antaŭsciigita pri la duelo, ne rajtas sin intermeti, por ĝin malebligi. Ĝi ne estas lia rolo. Ĉiu kontraŭulo havas siajn atestantojn, kiuj sole juĝas, ĉu la duelo devas okazi, aŭ ne. Se la atestantoj ne

konsentas inter si, oni devas sin turni al arbitracianto. La kuracisto ne estas kompetenta diri eĉ unu vorton por aŭ kontraŭ la duelo, kompreneble, se la motivo ne estas infana.

La kuracisto, asistanta ĉe duelo kaj helpanta al sia vundita kliento, ne devas esti punata nek eĉ persekutata.

Ŝajnas al mi, ke la alesto de la kuracisto ĉe duelo neniam povas esti dubebla. Se oni forlasus la duelantojn sen tuja helpo kaj se okazus gravaj vundigoj, ĝi ne estus plu duelo, sed preskaŭ mortigo, intencita mortigo.

Ĉiam du kuracistoj estas necesaj, po unu por ĉiu kontraŭulo, ĉar nur la kuracistoj estas kompetentaj decidi en kazo de vundigo, ĉu la dubatalo povas esti kontinua, aŭ devas esti ĉesigita kaj tiu ĉi decido devas esti farita ambaŭflanke.

Mi do opinias, ke la Ĉambro kuracista orientgalicia tute estis prava, esprimante la opinion, ke estus danĝere lasi la duelantojn sen helpo senprokrasta kaj ke la kuracisto ne devas malkaŝi la sekreton pri la okazonta duelo.

Mi finas, dirante, ke mi allasas duelon nur en la honoraferoj eksterordinare seriozaj aŭ en la kazoj de atencoj, fariĝantaj publike, kiel ĝi okazas iajoje en la Ĉambro

de deputitoj en Francujo. Mi neniam aprobas, se du junuloj en la aĝo de 18—20 jaroj duelas pro malgrava motivo aŭ por akiri la gloron, montrante al la kamaradoj belan cikatron meze de la frunto aŭ de la vango, kiel estas kutime en Germanujo ĉe la studentoj.

Laŭ mi en tiaj kazoj la kuracisto devas rifuzi sian helpon. Estas vere, ke la interesataj ĝin ne deziras.

17.

(Originalo franca).

D-ro Charles Vidal,
27 rue Emile Zola, Castres, Tarn.

Hanin difinas la komprenon „kuracisto“ jene: „Kuracisto, s. m. medicus, *ιατρος*, de *medicari* kuraci aŭ *μεδω*, mi flegas, kaj de *ιωμεναι*, mi sanigas, estas homo, kiu praktikas medicinon, kiu flegas malsanulojn kaj kies arto konsistas en malgrandigado do homaj suferoj aŭ en ilia forigado“.

Litré kaj Robin aldonas, ke „la kuracisto ŝuldas helpon kaj flegon al la proksimuloj, kiel tion ĉi de li postulas moralo kaj lia konscienco“.

Laŭ tiuj ĉi premisoj la konduto de la Ĉambro orientgalicia ŝajnas tre prava kaj oni povas nur aprobi, ke ĝi esprimis la opinion, ke estus efektive danĝere lasi la duelontajn sen tuja helpo en kazo de gravaj vundigoj.

Aliflanke estas firma la principo, ke neniam, en neniu kazo, la kuracisto povas malkaŝi ne sole la sekretojn, kiuj estis al li konfidentaj (speciale, ke duelo estas okazonta), sed ankaŭ tion, kion li sciigis pro sia profesio. En la unua kazo li malrespektus ordonojn de la honoro kaj en la dua kazo la sekreton profesion.

Tiu ĉi principo estas konforma al la indeco de la kuracisto, al ekzakta kompreno de lia rolo socia kaj al la socia neceseco de la sekreto kuracista.

Sekve, oni povas, laŭ mi, aserti:

1) ke la kuracisto ne malrespektas sian devon, akceptante inviton al duelo, ĉar eble tie estos vunditaj, bezonantaj kuracistan helpon;

2) ke li ĉiam devas akcepti tiun ĉi taskon, se nur liaj religiaj konvinkoj ne kaŭzas, ke li malaprobas la duelon. Tamen ankaŭ en tiu ĉi kazo ŝajnas al mi, ke, se la duelontaj povas nur lin peti pri helpo, pro diversaj kaŭzoj, li devas memori, ke lia esenca rolo estas kuraci kaj kuri kun helpo kontraŭ malsano, kiel soldato kuras kontraŭ

malamikoj, kiam la trumpetoj lin vokas, sub minaco de perfido.

3) Antaŭsciigita pri la duelo, la kuracisto ne devas sin intermeti. Tio ĉi apartenas al la atestantoj kaj amikoj de la duellantaj. Oni sin turnis al li, kiel al kuracisto, por ke li kuracu, se estos bezono.

4) Jes, estas necese, ke la leĝo starigu senpunecon de la kuracisto, kiu asistas ĉe duelo. La kuracisto devas ĉiam povi kuraci sen timo pri si mem. Tion ĉi postulas motivoj de humaneco kaj intereso socia.

5) Ĉeesto de la kuracisto neniam estas disputebla, kie versimile povas esti vunditaj, sekve ne ekzistas kaŭzo por serĉi konsilion kun kolego.

6) Ĉeesto de du kuracistoj en ĉiu duelo estas dezirinda pro antaŭzorgo.

7) Niaj asocioj profesiaj devus pridiskuti tiujn diversajn demandojn kaj precipe la asocio de S-ta Lukaso en Francujo, kiu estas katolika kaj kiu penas interkonsentigi la postulojn medicinistajn kun la devoj religiaj.

18.

(Originalo esperanta).

D-ro Briquet,
* 51 rue Nationale, Armentières.

La sciigo, kiun mi sendis al kelkaj ĵurnaloj pri via enketo, estis nun presita en: *L' Avenir médical,*
La Quinzaine thérapeutique,
Le Concours médical,
Le Répertoire de médecine et de chirurgie.

Tiu lasta ĵurnalo diras:

„Ni jam parolis (Répertoire 1902) pri la duelisto, kiu rifuzis pagi la medicinistan salajron. Doktoro Noir konsilis en tiu kazo alvoki la dueliston al la juĝistoj, sed ĉu la konsilo ne estas danĝera? Simila kazo estas maloftega, ĉar la kuracistoj, kiuj ĉeestas ĉe duelo, estas ofte intimaj amikoj de la duellantaj kaj tiuj ĉi devas oferi al ili donacon, kiu estas proporcia al la ĝeno“.

Jen miaj respondoj:

1) Ne, se oni ne estas haltigata de motivoj religiaj aŭ filozofiaj.

2) kaj 3) Ne. Oni estas ĉiam libera akcepti, aŭ rifuzi.

4) Ne, li ne devas zorgi pri tio.

5) Jes, sed mi pensas, ke ĉiam kaj en ĉiuj landoj oni senkulpigis la kuracistojn.

6) kaj 7) Jes.

8) Niaj asocioj havas multe da temoj pli gravaj por diskuti.

9) Ne.

19.

(Originalo franca).

D-ro Grosjean,
Héron.

1) Simple honoro ne permesas al kuracisto kunagi en la malbona faro, kiu cetere estas la plej granda malsaĝaĵo, kiun homo, tiel nomata civilizita, povas plenumi.

2) La kuracisto havas devon protesti kontraŭ la krimo, antaŭ ol ĝi efektiviĝos, do nenion fari, por sin doni al la dispono de la duelontaj.

Tamen se li estas alvokata, kiam la vundo jam estas farita, li sendube ŝuldasian helpon al la duelinto, kiel al ĉiu alia vundito.

3) La kuracisto principe devas rifuzi peton pri asistado en duelo kaj pri helpado en ĝi. Tamen estas eble, ke certaj cirkonstancoj permesos al li fari escepton el tiu ĉi regulo.

4) La deontologio ordonas al la kuracisto malhelpi la duelon, se tio ĉi estas ebla, ĉar „profilaksi al la vundo valoras pli, ol ĝin kuraci“. Kaj plie, ĉiu homo devas lasi al aliaj kiel eble fari plej malmulte da malsaĝaĵoj.

5) Ne estas dezirinde, ke oni starigu ĝenerale senpunecon de la kuracisto, kiu pro sia profesio asistas en duelo.

6) En esceptaj kazoj (vidu sub 3) estas dezirinde, ke okazu antaŭe interkonsiliĝo.

7) Se la ĉeesto de kuracisto en certa kazo estas permesita, estas bezonataj pli bone du, ol unu kuracisto.

8) Jes, en la regionoj, kie tio ĉi penindas.

20.

(Originalo franca).

D-ro Haller,
B'nche.

1) Honoro kaj speciale la honoro profesia, ne permesas al la kuracisto asisti kiel praktikulo ĉe duelo.

2) La kuracisto havas devon pro humaneco doni helpon al ĉiu vundito, kiam al tio ĉi prezentas sin okazo. Tamen en la kazo, kiam samtempe oni alvokus min al du vunditoj, unu viktimo de skermado aŭ duelo, alia viktimo de akcidento, mi ne hezitus iri unue al la lasta.

3) Kiel praktikisto, la kuracisto devas rifuzi asistadon ĉe duelo kaj eĉ atendadon en preteco, se oni lin bezonus je la fiksita tago kaj horo, kiam li scias, ke tio ĉi koncernas duelon.

4) La kuracisto, kiu scias pri la okazonta duelo kaj kiu kredas, ke li povas lin malebligi, devas tion ĉi fari.

5) Ne.

6) Ne.

7) Ne.

8) Ne.

9) Se oni allasus principe asistadon de la kuracistoj ĉe duelo, devus ĉeesti minimume ses kuracistoj, po tri por ĉiu du-elanto: iln devus akompani unu aŭ du ŝargveturiloj kun kompleta materialo por asepsaj operacioj.

KRONIKO.

Nia oferema kaj agema kunlaboranto d-ro Jorge S. de Hita (La Arboleda, Hispanujo) ricevas gratulojn de multaj samideanoj pro la eldono en hispana traduko de nia enketo pri mortpuno. Nun la aŭtoro pretigas la tradukon de la kuranta enketo pri partopreno de kuracistoj en dueloj.

Pro manko de spaco ni estis devigitaj nur malgrandan parton de tiu ĉi enketo enmeti en ĉi tiun numeron, kion ni intencas kompensi, dediĉante al ĝi plejparte la sekvantan.

* * *

„Le Moniteur Médical“, aperanta en Paris (1911 n-ro 18), publikigis artikolon pri esperanto el sub la plumo de d-ro A. Clerc (Vichy).

* * *

En „Burschenschaftliche Blätter“ (Berlin 1911 n-ro 11) presigis d-ro Hoeflmayer (Würzburg) respondon al nia enketo pri dueloj. Bedaŭrinde la aŭtoro dediĉis la pli grandan parton de sia verkaĵo al polemiko kun la aserto, ke leĝaro ĉie malpermesas al la kuracisto partopreni en dueloj. Tiu ĉi vorto „ĉie“ englitigis en la tradukon germanan, faritan de unu el la samideanoj, kvankam en nia demandaro ĝi ne troviĝis. Ĝustadire do la tuta polemiko de d-ro Hoeflmayer ne koncernas nin, sed la tradukinton. Cetere se la aserto, ke ĉie al la kuracisto estas malpermesite asisti ĉe dueloj, estas iom trograndigita, ankaŭ la kontraŭa opinio, ke nur en Svedujo la kuracistoj estus pro tio punataj kaj en ĉiuj aliaj landoj lasas la leĝdonantoj la kuracistojn senpunaj, ne estas konforma kun realeco. Ekzemple

en Aŭstrio nur en la projekto de nova kodo puna estas proponata senpuneco de la kuracistoj.

La redakcio ricevis:

Gvidlibro tra Bad Reichenhall, internacia

kuracloko en la germanaj Alpoj. Eldonita de la esperantista grupo en Bad Reichenhall, Germanujo.

Kelkaj vortoj pri teosofio. Parolado de s-ino Diou-Trouillon. Paris, Presa Esperantista Societo. 33 rue Lacépède. Prezo fr. 0.25.

ENHAVO:

D-ro Kunschert (Wiesbaden). Hemeralopio en la prusa armeo.

D-ro L. Skorscheban. Ĉis kiu grado povas ekonomia organizacio de kuracistoj malakceli la dekadencan de nia ekonomia ekzistado? Tradukis d-ro Sós.

D-ro Séverin Icard (Marseille). Postmortaj operacioj sur vivaj personoj. (Daŭrigo).

Partopreno de kuracistoj en dueloj. (Enketo internacia). (Daŭrigo). Francujo. Opinioj de d-ro René Feilhoen (Roubaix), d-ro Charles Vidal (Castres, Tarn), d-ro Briquet (Armentières), d-ro Grosjean (Héron), d-ro Haller (Binche).

Kroniko.

TARIFO DE LA ANONCOJ:

Spaco	Unufoja enpresio:	Almenaŭ 6-foja enpresio por ĉiu:	Almenaŭ 12-foja enpresio por ĉiu:
$\frac{1}{1}$ tuta paĝo	70 kron. aŭstr.	60 kron. aŭstr.	40 kron. aŭstr.
$\frac{1}{2}$ da paĝo	35 kron. aŭstr.	30 kron. aŭstr.	20 kron. aŭstr.
$\frac{1}{4}$ da paĝo	18 kron. aŭstr.	16 kron. aŭstr.	12 kron. aŭstr.
$\frac{1}{8}$ da paĝo	10 kron. aŭstr.	9 kron. aŭstr.	7 kron. aŭstr.
$\frac{1}{16}$ da paĝo	6 kron. aŭstr.	5 kron. aŭstr.	4 kron. aŭstr.

Pola Esperantisto

monata gazeto por propaĝando de Esperanto.

Jara abonprezo kun „Liter. Jarlibro“ rb. 2.50 (Sm. 2.65), — Sen „Liter. Jarlibro“ rb. 2.00 (Sm. 2.10).

Adreso: Warszawa — Varsovio (Polujo)
Redakcio — Krucza 47-A, Administracio
Hoza 20.

Depost komenco de januaro 1911, dum la kvara jaro de sia aperado

Germana Esperanto - Gazeto

estos eldonata en formo de ĉiusemajna revuo kun riĉa raporta kaj literatura enhavo kaj diversaj intereseĝaj aldonoj.

Sola regule aperanta esperantista semajna gazeto

la plej malalta abonprezo, en Germanujo rekte mendebla ĉe la poŝticejoj (N-ro 560 de la listo) por M. 1,25 jarkvarone, eksterlanden por Sm. 3,50.

Specimeno kontraŭ respondkupono.

Abonantoj ricevos niajn eldonaĵojn: **La blonda Ekberto 0,20 Sm.** — **Hermano kaj Doroteo de W. v. Goethe, esp. B. Küster 0,50 Sm.**

kun 20% da rabato.

Oni aldonu aŭ monon aŭ respondkuponon por la alsendo. Nur mendoj superantaj la sumon de Sm. 2,50 (sen abonprezo) estas efektivataj afrankite.